



# aktuala

**34-a ELDONJARO**  
**Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.  
 Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be. Abona membrigo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Héléne Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant Ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetbols.be> <http://uea.org> [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) <http://eo.eventeo.net>  
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne spegulas nepre opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Héléne Falk-Bracke pri Lidia Zamenhof (2a parto)
- Paĝo 3 - Sukcese premieris novtipa ekzameno de UEA
- Paĝo 4 - Akademio de Esperanto, Esperanto en Usono, Angolo, Ĉinio
- Paĝo 6 - Fundamentaj 16 reguloj, alfabeto, tabelo de korelativoj
- Paĝo 8 - Ŝekspiro, Bronŝtejn, Neĉaev, Pessoa, A.Garcia, J.J.Santos
- Paĝo 10 - Heroldo de Esperanto aperas pirate jam de 10 jaroj
- Paĝo 11 - Kerstin Rohdin pri vojaĝo al Krimeo kaj Aroma Jalto
- Paĝo 15 - Vortenigmoj kaj Falsaj Amikoj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Februaro 2009

- 4 Marcel Delforge pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio
- 11 Marek Blahus, studento en Loveno el Brno, pri Ĉeĥio
- 18 Barbara Poterucha pri historiaj skizoj el Pollando
- 25 Georgia Henningsen pri Chopin, vivo kaj amo

### Marto 2009

- 4 Katarzyna Kuszke pri la tago de la virino
- 11 José Augusto Pinto de Sousa pri pola radio en esperanto
- 18 Bernard-Regis Larue pri unuaj malkovroj de la planedo Marso
- 25 André Demarque pri tradukekzerco en Esperanton de leteroj de Van Gogh

### Aprilo 2009

- 1 Kostjantin Demjanenko el Ukrainio pri ictiologio en maro Azova
- 8 Bernard-Regis Larue pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso
- 12 **Paska dimanĉo**
- 15 Héléne Falk-Bracke pri kanzonoj kaj folkloraj kantoj de Zamenhof-a tempo
- 22 Jan Amadori pri kaprompiloj, ludenigmoj, puzloj
- 29 Marcel Delforge pri vojaĝoj en Pollando

Grupanoj aŭ ne, novaj prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci tuj.

## LA VIVO DE LIDIA ZAMENHOF, FILINO DE ESPERANTO (2a parto)

Ludoviko Lazaro Zamenhof mortas je la 15-a de Aprilo 1917. Depost 1914, lia sanstato estas malbona. Por li, kiu de ĉiam kontraŭbatalis naciismon kaj estis pac-batalanto, la milito estis tro forta bato. Je lia entombigo, multegaj homoj akompanas lin al la juda tombejo. Sed estas milito, la limoj estas fermitaj, eksterlandaj esperantistoj ne povas partopreni. La funebran procesion sekvas ĉefe malriĉaj varsoviaj judoj, kiuj scias nur ke la forpasinto estis ilia bona okulkuracisto, kiu kuracis ilin kontraŭ kelkaj kopekoj, eĉ kontraŭ nenio. Inter la funebrantraj distingigas unu germana oficiro, Majoro Neubarth, la komandanto de la haveno, kaj unu alia germana esperantisto.

Post la milito, sendependa Polio restariĝas. Dum unu jarcento, la lando de la Poloj estis dispartigita inter Rusio, Aŭstrio kaj Germanio. Sed post la milito multaj politikaj kaj sociaj tumultoj disdividas la polojn. La unua prezidento demokrate elektita estas murdita du tagojn post lia enoficiĝo en 1922, ĉar li estis elektita helpe de la Bloko de Naciaj Minoritatoj, kiun gvidis judo. En kelkaj preĝejoj okazas dankmesoj pro tio ke la « prezidento de la judoj » estis mortigita. Estiĝas registaro de dekstruloj.

Nun, la esperantistoj esperas multe de la **Ligo de Nacioj** - sed pro franca naciisma premado, LDN faligas la aferon. Kiel iam diris Z. « La Nacioj atentus pri la afero kiam la movado mem estos sukcesinta » Esperantista celo: « Ĉiu infano sciu almenaŭ du lingvojn: la denaskan kaj Esperanton ». Plie, malkonsento pri la demando de neŭtralismo dispartigas la esperantan movadon inter neŭtrala movado **UEA** kaj **SAT**, kies celo estas per Esperanto estiĝi socialisman, demokratian socion.

Rezulte de ege sukcesaj kursoj en diversaj landoj, Esperanto disvastiĝas ĉefe en socialismaj rondoj. Poloj konsideras ĝin kiel judan aferon, kaj en okcidenta Eŭropo, la ĝenerala opinio estas ke Esperanto havas danĝeran revolucion tendencan.

La unua postmilita kongreso kiun la tri gefiloj de Zamenhof partoprenas estas la **Geneva** en 1925. Lidia konatiĝas tie kun **Marta ROOT**, sendependa usona ĵurnalistino, 53 jaraĝa, bahaanino kiu vojaĝas tra la mondo por disvastigi la bahaan kredon, kies celo estas «unu sola religio por la tuta homaro, elĉerpado de la fanatismoj, adopto de Esperanto kiel komuna helplingvo». Tiu religio estiĝis en Persio (Irano) meze de la 19-a jarcento (Baha-ullah). Ĝia filozofio tre similas la homaranismon. Lidia multe simpatias kun Marta Root, sed tiutempe religio tute ne interesas ŝin. Ŝi kreskis en hejmo en kiu nenia religio estis praktikata. Pri si mem, ŝi asertas ke ŝi estas ateisto. Finfine, en 1929, ŝi iĝos baha kredanto kaj parolos en ĉiu kongreso pri Esperanto kaj pri Bahaismo, kio ne plaĉos al ĉiuj esperantistoj. Héléne Falk-Bracke

Du rimarkoj de Héléne Falk-Bracke: 1- En Esperanto, oni skribas LIDJA sed la titolo de la libro estas LIDIA-kion mi devis respekti).

2- Tajperaro en la lasta artikolo bvl legi komence de la 5-a linio: 1920aj jaroj (kaj ne 1930).

## ESPERANTON AL EŬROPA PARLAMENTO

### Ljudmila Novak proponis

Membro de Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak prezentis la 21-an de januaro 2009 al la Eŭropa Parlamento en Komitato por Kulturo sub la signo: PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura tri proponojn pri ŝanĝoj de artikolo 4:

**Propono pri ŝanĝo:**

4a. (nova) konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel "lingua franca".

**Propono pri ŝanĝo:**

4b. (nova) proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulantem lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.

**Propono de ŝanĝo:**

4c. (nova) konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efektojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

[www.edukado.net](http://www.edukado.net)

## AKADEMIAJ REKOMENDOJ

1. La Akademio de Esperanto malkonsilas la uzadon de la prepozicio "**po**", por esprimi la rilaton indikitan per la frakci-streko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu "Lingva Respondo".

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj "en", "je", "por" aŭ "sur" laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverban formon, kiel "30 kilometroj(n) hore".

2.a) Oni skribu "**ekde**" aŭ "**eke de**", sed ne "**ek de**" per du vortoj, ĉar "ek" estas tie uzata prefikse aŭ adverbe, sed ne kiel interjekcio.

2.b) Oni ne uzu "**dankema**", kiam ne temas pri konstanta emo al danko, sed pri la momenta manifestiĝo de danko pro konkreta servo oni simple uzu "**danka**".

2.c) Oni ne konfuzu "**rekomenci**" kun "**kompensi**": "kompensi" signifas havigi (al iu) ion egalvaloran pro suferita perdo, malprofito aŭ farita peno; "rekomenci" signifas montri sian kontentecon pri ies meritoj per vortoj, faroj aŭ donacoj (kvankam la bona ago ofte rekomencas la farinton propramove per sano, feliĉo, kontenteco, interna paco); "rekomenci" estas preskaŭ ĉiam "malpuni".

Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - No. 10

## SUKSESE PREMIERIS NOVTIPA EKZAMENO

Post keljara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Partoprenantoj de la Internacia Festivalo en Düsseldorf havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon (31-12-2008). Sume 8 personoj el 6 landoj uzis la eblecon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon, bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la ĉiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo kontraktita kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, Hungario, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelajn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La surlokajn buŝajn ekzamenojn en Düsseldorf gvidis Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy, ambaŭ trejnitaj ekzamenantoj laŭ la KER-postuloj. UEA kore gratulas al la unuaj ekzamenitoj, kiuj bonege sukcesis en la buŝa parto. Estas ĝojige, ke tiom multaj ekzamenigintoj anoncis sin malgraŭ la jarfina festo kaj la mallonga tempo, kiu restis post la fina decido okazigi la ekzamenojn ankoraŭ en 2008.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum la Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 de aprilo; dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en majo; kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando) en julio.

Gazetaraj Komunikoj de UEA - Numero 314

**La redakcio ĝoje informas ke inter la menciitaj unuaj ekzamenitoj al la plej supera nivelo C1 en Düsseldorf, estis la ĉefa redaktoro de "Aktuala Esperanto". Ekzamenantoj estis Renato Corsetti kun Zsófia Kóródy, helpataj de Sándor Hideg el Hungario (vidu foto apude).**



Zsófia Kóródy ekzamenis la ĉefan redaktoron en Düsseldorf

## NOVAJ UEA-EKZAMENOJ

Post plurjara kunlaboro, en kiu edukado.net havis gravan rolon, UEA lanĉis novan internacian ekzamen sistemon de Esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn.

La novaj ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) nun estas ellaboritaj (el la 6 ekzistantaj) en niveloj B1, B2 kaj C1. La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la ŝtate rekonataj fremdaj lingvoj kaj kadre de ties ekzamen sistemo havas la samajn rajtojn kiel la aliaj fremdaj lingvoj. Plurmil kandidatoj estas testataj ĉiujare en la menciitaj niveloj en la t.n. dulingva (hungara-Esperanta) versio de la lingvaj ekzamenoj.

La fakto, ke la nova ekzameno konstruiĝis baze de la eŭropaj normoj, signifas, ke ties atestilon oni oficiale agnoskas kaj traktas kiel la aliajn lingvoekzamenajn diplomojn, akreditigitajn de ALTE.

Mem la atestilo estas impona, lede kovrita dokumento, verkita en 4 lingvoj (hungara, angla, germana kaj franca) kun la kompletiga internaĵo en Esperanto.

En la sekcio PRISKIBOJ vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.

Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova IELI-UEA-ekzamenoj en la novtipa ekzameno nur en la buŝa parto estas demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto.

Ni esperas, ke la nova sistemo havos sukceson inter la esperantistoj kaj ties ekzamenojn trapasos multaj el inter ili, pruvante, ke valoros la investita laboro kaj tempo, kaj ke nia movado pretas je eŭroprnivela mezurigo.

Ni antaŭvidas 3 sesiojn en la sekvaj monatoj, momente ĉiujn en Eŭropo, sed la koncernuloj laboras pri tio, kiel la ekzameno povas esti okazigita ankaŭ en aliaj kontinentoj.

Edukado.net daŭre kunlaboros por la okazigo de la ekzamenoj kaj ene de kelkaj monatoj, kunlabore kun la budapeŝta centro funkciigos retan (on-line) ekzamenon, kie la interesiĝantoj senpage povos testi sin antaŭ ol aliĝi al la ekzamenoj.

Je ajna informbezono, bv kontakti nian redaktejon redaktanto @ edukado.net, aŭ Zsófia Kóródy korody @ googlemail.com. <http://www.edukado.net/>



Tri ekzamenigintoj en Düsseldorf, 31-12-2008

3

## AKADEMIO DE ESPERANTO

La Universalaĵ Kongresoj [UK] kaj la Akademio de Esperanto [AdE] estas la du solaj institucioj, kiuj rekte devenas de publikaj proponoj de Zamenhof (1859-1917) mem en la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Marco inter la 5-a kaj la 13-a de Aŭgusto 1905. Efektive, estis tie aprobita unue la kreo de Komitato simple Lingva, kiun prezidis Zamenhof, sed poste el propono de li mem tiu Lingva Komitato pli nombriĝis por inkluzivi konatajn redaktorojn de Esperantaj gazetoj, prezidantojn de verdaj societoj kaj gravajn esperantistojn: pli ol cent membroj en sia unua konsisto! Li rezignis la prezidantecon, kiun alprenis Emile Boirac, filozofa kaj rektoro de la Universitato de Dijono. La krizo de Ido, kiu ekvulkanis en Februaro 1908, komprenigis al la prezidanto de la Lingva Komitato la neeblecon rapide labori kun tiom da membroj disigintaj tra la mondo. Sekve de tio, li proponis la kreon de supera komitato, Akademio kun ne pli ol 18 membroj, kaj balote aprobis lian ideon. La Lingvan Komitato kaj ĝian Akademion prezidis inter 1905 kaj 1917 profesoro Emile Boirac (1851-1917). Sekvis tri jaroj da interrompo pro la Unua Mondmilito. Inter 1920 kaj 1931 prezidis profesoro Théophile Cart (1855-1931), inter 1931 kaj 1933 aktuario John Mabon Warden (1856-1933), inter 1933 kaj 1937 inĝeniero Maurice de Lisle (1859-1943), inter 1937 kaj 1963 inĝeniero Johannes R. C. Isbrücker (1889-1967), kiu dissendis en Julio 1939 la 19-an Cirkuleron sen ia respondo. La tri unuajn prezidantojn eksigis la morto: pli bone mi ne kandidatiĝu por esti la kvara! Tiu nia unua periodo respondis laŭ mi pri **tri ĉefaj laboroj**:

-1. Ses Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro aperintaj inter 1909 kaj 1935.

-2. Korektoj de eraraj tradukoj en la Universala Vortaro de la Fundamento de Esperanto inter 1906 kaj 1923.

-3. Rifuzo oficialigi la internacian *-io* por landnomoj en 1922.

La agado de la Akademio restis interrompita per la Dua Mondmilito dum pli ol ses jaroj. La dua periodo komenciĝas en Marto 1946 per la postmilita 20-a Cirkulero, subskribita de Isbrücker, kun respondoj de 48 el la 102 membroj de la Lingva Komitato. La precipa ago de tiu nova periodo estis la profunda reformo de la Institucio per la malaperigo de la Lingva Komitato kaj la restigo de la sola Akademio: la proponoj, inter ili la nova Statuto, estis aprobitaj en 1948.07.20.

Du aparte **gravaj decidoj** en lia mandato:

-1. Oficialigo de la neinternacia *-enda* en Julio 1953, unu el la maloftaj malvenkoj de Gaston Waringhien, kiu voĉdonis kontraŭ ĝia aprobo.

-2. La Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro, preparita de Gaston Waringhien en Junio 1955 kaj aprobo voĉdonita en Julio 1958.

En 1963 Gaston Waringhien fariĝis prezidanto, kaj tiun postenon li forlasis nur en 1979. La plej konata strebado de lia prezidantecon estis la reformo de la

4

Statuto de 1948, aprobita en Julio 1964, kiu validis ĝis la nova reformo en la mandato de André Albault. Kun la Statuto farita kaj aprobita, li lancis sin al malfacila batalo, kiu dividis nian rondon en du grupojn de atistoj kaj itistoj: la senco kaj la uzo de niaj partipoj. Maldolĉan malvenkon li suferis en Novembro 1966, kiam lia propono estis malaprobita per unu sola mankanta voĉo. La sekvantan jaron li havis facilan venkon en Novembro 1967, kvankam per diskutinda driblo kaj manovro: aprobo de kvar frazoj, en kiuj aperis la kontestataj partipoj. Bedaŭrinde, lia venko restis sole sur la papero, ĉar ĝis nun multas kaj tumultas la eraroj kontraŭ la vera senco de tiuj delikataj vortoj: el abundo venas vundo... Estis aliaj **gravaj taskoj** portitaj de li al plena sukceso:

-1 Oka oficiala aldono al la Universala Vortaro.

-2 Baza Radikaro Oficiala.

-3 Rekomendoj de la Akademio: Pri la refleksivo kaj pri la vorto "po".

Post la kvin mandatoj de Gaston Waringhien (1901-1991) sekvis William Auld (1923-2006.09.11), kiu prezidis la Akademion inter 1979 kaj 1983. Al li ni ŝuldas gravan defendon de niaj supersignitaj literoj. Lin la verda Deino tenu en sia sino! André Albault (1930) komencis sian tempon en 1983 kaj ĝin okupis precipe per intensa laborado super landnomoj, kiuj ĝis nun levas disputojn. Pro la manko de jura personeco, per kiu li provis sen sukceso doti la Akademion, li starigis leĝan internacian asocion nomatan La Amikoj de Esperanto (1987.05.24), kiu helpis nian plej antikvan Institucion kaj eldonis samnoman bultenon por disvastigo de la akademaj laboroj per siaj tridek numeroj inter 1987 kaj 1995. Multo de la elspezoj de nia Akademio estis tiam kovrataj de tiuj amikoj. Grava estis lia redaktigo de la tria reformo de la Statuto de la Akademio de Esperanto en 1988, ĝis nun valida. En 1998 ekprezidis la Akademion Geraldo Mattos (1931), la unua neeŭropano en tia posteno. En lia mandato estis kreita la Konsultejo de la Akademio de Esperanto, tiam komisiono kaj nun sekcio, kaj estis voĉdonita la 9-a Oficiala aldono al la Universala Vortaro, laboro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro sub la direktoreco de Bertilo Wennergren, krom decido de la Sekcio pri Prononco sub la direktoreco de Probal Dasgupta por klarigo pri niaj supersignoj sur la ekrano de komputilo.

En 2007 elektiĝis nuna prezidanto, John Wells.

Geraldo Mattos Gomes dos Santos, eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)

## INSTRUI ESPERANTON EN USONAJ LERNEJOJ

Multaj el vi jam scias pri eksterordinara aktiviĝo de la tutmonda esperantistaro lastatempe ĉirkaŭ propono de TEJO-aktivulo Oleg Izyumenko ĉe [www.change.org/ideas/view/](http://www.change.org/ideas/view/)

introduce\_esperanto\_as\_a\_foreign\_language\_subject\_in\_schools

ke la nova usona prezidento Barack Obama agu por enkonduki Esperanton kiel unuan fremdan lingvon en usonaj lernejoj. Aperis kelkaj pravaj atentigoj pri unu-du pridubeblaj aspektoj de la

propono - precipe, ke la lerneja politiko en Usono estas determinata tre multe pli de la registaroj de la individuaj usonaj ŝtatoj ol de la nacia registaro - sed UEA tamen rigardas la ĉi-rilatan agadon kiel rimedon por disvastigi Esperanton kaj do, ĉar tio estas Statuta celo de UEA, subtenas ĝin kaj kuraĝigas vin iri al la supra TTT-adreso kaj registri vian subtenon al la propono - kiu, cetere, havas bonan ŝancon finiĝi inter la plej subtenataj el ĉiuj proponoj, kaj eĉ kiel la unua en la rubriko Edukado (Education). Roy McCoy / Centra Oficejo de UEA

### ESPERANTO EN ANGOLO

En la jaroj 2007-2008, la mondĉivitanoj vivantaj en Angolo sukcesis preskaŭ nenion fari ĉar S-ro Michel Dialundama, kiu estas prezidanto de la mondĉivitana movado en Angolo bataladis kontraŭ la koleraj policistoj kiuj, nome de registaro ofte atakis la mondĉivitanan kvartalon Paciença en Luando. S-ro Michel Dialundama, Mondĉivitano, en Angolo havas problemon kun la Registaro pri la kvartalo kiun li estras. La kvartalo Paciença sektor 5 de Kamama kie troviĝas la Esperanto-Domo estas detruita. S-ro Michiel Dialundama kiu defendas la kvartalon laŭ la homaj rajtoj havas problemon kun la Luanda registaro. Kvankam la tribunalo pravigis la popolon de la kvartalo, ĉiam la koleraj kaj malhoneste policistoj daŭrigis la detruon de la domoj de malriĉuloj. La kvartalo jam atingis ĉirkaŭ 14.000 loĝantojn; La altaj aŭtoritatoj de Luando retrovis siajn konsciencojn. Nun ni estas trankvilaj. Tial en la jaro 2009, Michel Dialundama espereble plenumos sian taskon, bone organizi tiujn mondĉivitanojn en Angola respubliko. Ni jam propagandas pri la movado kaj disdonas la deklaron de homaj rajtoj kaj la projekto: "Esperanto para diversidade linguística em Africa" tradukita de S-ro João José Santos de Portugalio por interesigi la loĝantojn fariĝi membroj kaj scii siajn rajtojn, se eble mendi legitimkarton kiel mondĉivitano. Esperanto-Domo bonege fartas, la kvartalestraro de kvartalo Paciença sektor 5 de Kamama (kie troviĝas E-Domo) donacis terenon de 15m/15m al Angola Esperanto Asocio por konstrui sian sidejon kaj tiun de mondĉivitanoj, ankaŭ decidis konstrui la popoldomon (laboroficejon) en la strato Esperanto por ke ĝi fariĝu la plej fama strato de la kvartalo.

Ferdinando Kinkani - Luando - 08/01/2009  
 Prezidanto de Angola Esperanto-Asocio  
 Esperanta retejo "Monda Demokratio"  
[www.recim.org/dem/gazet-ao.htm](http://www.recim.org/dem/gazet-ao.htm)  
 Germain Pirlot kolektis

entuziasme partoprenis la kurson, ricevis la diplomon "Parto A". Ĉiuj esprimis sian deziron daŭrigi la lernadon de la internacia lingvo, kio okazos ekde marto ĝis junio 2009. Dum la instruado oni uzis ĉiujn pedagogiajn kaj teknikajn rimedojn. Ja tiu alternejo estas sufiĉe bone ekipita, kun ĉiuj bezonataj teknikaĵoj: komputiloj, projekciiloj, granda ekrano, ktp. Unu el la plej ŝatataj partoj de la kurso estis tiu dum kiu oni kontaktis pere de la reto esperantistojn el aliaj landoj, ĉefe junajn (el Pollando, Francio, Ukrainio, ktp). Ili havis la eblecon aŭskulti kaj paroleti kun tiuj alilandaj samideanoj. Vere ili restis ravitaj pro tiu sperto. La etoso de la kurso estis tre agrabla. Ĉiuj gelernantoj estis vere laboremaj kaj diligentaĵaj, kaj tre ĝentilaj. Por mi, kiel profesoro, ankaŭ tiu sperto estis ege agrabla, kaj pro tio mi revenos al Ĉinio por daŭrigi la instruadon, en respondo al la insista peto de ĉiuj. Speciale oni devas danki la direktoron de la lernejo, S-ro Peng Jin, organizanto kaj motoro de la kurso, kaj la lokajn esperantistojn, S-roj Lin, prezidanto de la Esperanta Asocio de Kantono, kaj Liu Weizhuan, Ĝenerala Sekretario, kaj kun-instruanto de la kurso. Por la daŭrigo de la kurso, "Parto B", oni anoncas pli amasan partoprenon. Eĉ multaj el la lernantoj de la hispana lingvo enviis siajn kolegojn, kaj volas baldaŭ aliĝi al la kurso de Esperanto. Ĝenerale ekzistas ideo ke por ĉinoj lerni fremdajn lingvojn estas malfacile. Tamen mi ne spertis tion. Eĉ mi povas diri ke ĉinoj pli facile lernas fremdajn lingvojn ol alilandanoj la ĉinan. Sola malagrablaĵo por mi estas la fakto ke, kvankam ni ĉiam propagandas ke pere de nia lingvo oni povas koni aliajn landojn kaj kulturojn, havi amikojn en la tuta mondo, tamen tio rilate ĉinojn estas nur duonvero. Ege malfacilas por ili havi la eblecon vojaĝi al aliaj landoj. Ni havu la esperon ke Esperanto helpas detru ne nur la lingvajn barojn, sed ankaŭ la doganajn barojn.

Augusto Casquero de la Cruz



Augusto Casquero de la Cruz kun liaj lernantoj diplomitaj

5-A IBERA RENKONTIĜO, 6-8 MARTO, OPORTO, PORTUGALIO,  
<http://esperanto.pt/ir2009/>

### DISDONADO DE ESPERANTAJ DIPLOMOJ

La 26an de novembro okazis oficiala kaj kortuŝiga ceremonio de disdonado de diplomoj al la gelernantoj de la kurso de Esperanto, okazinta en la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj Studoj de la ĉina urbo Foŝan, proksime de Kantono. Kvindek da gelernantoj (kaj kelkaj profesoroj) ĉeestis la kurson. La gelernantoj, kiuj aktive kaj

### LA 16 REGULOJ DE LA FUNDAMENTO

La Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto, unuafoje eldonita en 1903 fare de L. L. Zamenhof, estis frua kolektaĵo de pli ol cent modelstilaj verkaĵoj en Esperanto, kaj originala literaturo kaj tradukaĵoj. En la Krestomatio aperas Esperanto-versio de la Fundamenta gramatiko. Jen la temoj de la 16 reguloj de la Fundamento:

1. Artikolo difinita "la" egalas laŭ sekso, kazo kaj nombro. Artikolo nedifinita ne ekzistas.
2. Nomoj aŭ substantivoj finiĝas per "o". Pluralo aŭ multenombro aldonas "j". Rekta komplemento havas akuzativan finiĝon (=finajon) "n". Ceteraj kazoj estas esprimitaj per helpo de prepozicioj (la genitivo per de, la dativo per al, la ablativo per per aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).
3. Adjektivoj finiĝas per "a" kaj akordiĝas al la nomoj, kvante kaj akuzative. La komparativo estas farata per la vorto pli, la superlativo per plej; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion ol.
4. Numeraloj kardinalaj estas nevariaj, ne deklinaciaj. Numeraloj fundamentaj estas : unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por numeraloj ordaj aŭ ordinalaj oni aldonas la finiĝon (=finajon) de la adjektivo. Per aldono de "a" aŭ "o" aŭ "e" fariĝas numeraloj adjektivaj aŭ substantivaj aŭ adverbaj. Per aldono de sufikso "obl" fariĝas multobloj (duoblo, trioblo, ktp). Aldonante la sufikso "op" fariĝas kolektivaj (duopo). Per aldono de sufikso "on" fariĝas frakcioj (duono). Per uzo de la prepozicio "po" fariĝas distributivaj (po du). Do obl estigas multoblojn (duoblo); on estigas frakciojn (duono); op estigas kolektivajn (duopo); kaj la prepozicio po estigas distributivajn (po du).
5. Pronomoj personaj : mi, ci aŭ vi, li, ŝi, ĝi (pri objekto aŭ besto), si (refleksivo), ni, vi, ili, oni. La pronomoj posedaj estas formataj per aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.
6. Verboj estas ĉiam regulaj, ne ŝanĝiĝas finiĝo laŭ persono aŭ nombro. La finiĝo varias nur laŭ modo kaj tempo. Modo infinitiva finiĝas per "i", modo imperativa per "u", modo kondiĉa per "us", modo indikativa havas tempojn estantan, estantan, estontan finiĝantajn per "is, "as, "os". Participoj aktivaj finiĝas per "inta", "anta", "onta". Participoj pasivaj finiĝas per "ita", "ata", "ota". Ekzistas nur unu helpa verbo "esti" (ekzemplo: mi estas faranta). La prepozicio ĉe la pasivo estas de.
7. La adverboj finiĝas per e; gradoj de komparo kiel ĉe la adjektivoj. (Pli rapide ol; plej rapide el).
8. Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon (ne akuzativon). Se ili estas sekvataj de akuzativo, tio okazas ne pro la prepozicio mem, sed pro alia kaŭzo.
9. Skribado estas laŭsona. Vortoj estu prononcataj laŭ skribo. Ne ekzistas nelegataj literoj.
10. La vort-akcento falas ĉiam sur la antaŭlasta silabo. Ekzemple: labori ; familio.

11. Vortoj formataj per kunigo de du aŭ pli vortoj havas la bazan radikon en la fino (la ĉefa vorto staras en la fino). Ekzemple: Birdokanto estas kanto de birdo; Kantobirdo estas birdo kiu kantas. La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

12. Neo aŭ nego duobla ne uzeblas. Por signifi ke mi ne fumas, oni diru "mi neniam fumas" sed oni ne diru "mi neniam ne fumas".

13. Oni uzu la finiĝon de la akuzativo -n por indiki la direkto kun movo. Ekzemple: Kien vi iras? Iri antaŭen. Iri supren. La kato saltas sur la tablon (el la planko). Se la kato saltus sur la tablo, li jam daŭre estus sur la tablo, ne saltus el la planko!

14. Ĉiu prepozicioj havas nur unu difinitan kaj konstantan signifon, krom la prepozicio je kies signifo estas nedifinita. Ekzemple: Mi parolas pri vi. Kredi je io. Je kioma horo? Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

15. La vortoj internaciaj esperantiĝas tra ortografa adapto. Ekzemple: teatro, radaro. Tamen ĉe diversaj vortoj el unu nacilingva radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formoj el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

16. La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo. (Venas l' temp').

### ZAMNEHOF-A ALFABETO KUN 28 LITEROJ

A a B b C c Ĉ ĉ D d E e F f  
 G g Ĝ ĝ H h Ĥ ĥ I i J j Ĵ ĵ  
 K k L l M m N n O o P p R r  
 S s Ŝ ŝ T t U u Ŭ ŭ V v Z z

Rimarko: Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭi ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u (senŝanĝe).

### LA TABELO DE LA 45 KORELATIVOJ

Tabelo	nedefinita	demandanta	mon-	kolekta	nea	
de la 45	finaj	rilata	tra	disdona		
korelativoj	i-	ki	ti	ĉi	neni	
-u	ula	iu	kiu	tiu	ĉiu	neniu
-o	aja	io	kio	tio	ĉio	nenio
-a	kvalita	ia	kia	tia	ĉia	nenia
-es	poseda	ies	kies	ties	ĉies	nenies
-e	loka	ie	kie	tie	ĉie	nenie
-am	tempa	iam	kiam	tiam	ĉiam	neniam
-el	maniera	iel	kiel	tiel	ĉiel	neniel
-al	kaŭza	ial	kial	tial	ĉial	nenial
-om	kvanta	iom	kiom	tiom	ĉiom	neniom

## KONCERNIGU VIN PRI VIVMEDIO

Kial do mi kapablas kompreni la veran danĝeron de la tera plivarmiĝo, kiam la moŝtuloj kiuj estus supozataj decidi por nia bono ne ŝajnas havi eĉ la plej malgrandan ideon pri tio? Mi ŝatus povi klarigi ĉar, finfine, tio estas sufiĉe simpla... Ekde kiam la homo inventis maŝinojn, la tera temperaturo altiĝis je ĉirkaŭ unu celsia grado. Kaj, ne eblas remalaltiĝi la teran temperaturon ĉar oni tutsimple ne povas malvarmigi planedon. Kaj oni imagas ke la plenkreskuloj faros ion kontraŭ tio? Tute ne! Ili daŭre konstruas pliajn maŝinojn, kiuj okazigas ĉiam pli da polucio. Dum ĉiuj spertuloj kaj sciencistoj diras ke, ĉiukaze, la Tero varmiĝos ankoraŭ je almenaŭ duongrado.

La moŝtuloj legas la raportojn; ŝajnas ke pli ili ne kapablas aŭ ne volas fari. Ŝajnas ke ĉiuj nur atendas por vidi kio okazos. Sed same kiel ni scias kio okazas kiam la tajdo flugas, ni povas tre facile imagi tion, kio okazos.

Multaj homoj devos fuĝi, forlasi siajn hejmojn, siajn landojn. La naturo ne plu eltenas. Instaligos malriĉegeco, militoj eksplodos, akvo mankos aŭ troos. Kaj tamen la moŝtuloj legis ĉiujn raportojn; sed ili ŝajnas ne kompreni.

Forfuĝi ne estas solvo. Kiu povas helpi min klarigi? Vidu! La Tero jam plivarmiĝis je pli ol unu grado. Nun, se la temperaturo plu altiĝas, je ĉirkaŭ du gradoj, la tero komencus plivarmiĝi per si mem, pli kaj pli rapide! Kaj tio estos tute neregebla. Neniu spertulo kapablas prognozi tion, kio okazos tiukaze. Sed ili ja scias ĉion: ni ankoraŭ havas inter kvar kaj dek jarojn por finfine ne trafi tien. Ni devos nur unuigi kaj laŭte krii:

**AGU NUN!**

Kaj se ili ankoraŭ havos siajn stultajn ridetojn...

**Agu nun, diable! Ne parolu – Agu!** Diru tion al ili, ĉar min ili ne aŭskultos. Sendu ĉi tiun filmeton al ĉiuj viaj amikoj kaj al ĉiuj troveblaj politikistoj. Ni vere bezonas leĝon por redukti la gaslĵetojn antaŭ ol estos tro malfrue. Sur la retpaĝaro [www.thebigask.be](http://www.thebigask.be) vi vidos kiel fari. Agu nun!

Kolektis kaj elfrancigis Muriel Petit, membro de EBG

## LEO-GROJ KAJ TIG-ONOJ

Herkulo, en la foto, estas la nomo de tiu leogro, leono-tigro, naskita de nehomcelita seks-kuniĝo de leono kaj tigrino vivantaj en granda parko de la Instituto por protektado de bestoj minacataj de malapero en Miami, Florido, Usono. Kompare kun siaj gepatroj, li estas giganto, trijaraĝa pezas jam 500 kilogramojn. Po-tage manĝas li pli ol 100 kilogramojn da bovaĵo aŭ kokaĵo. Por unu nura manĝo povas li manĝi ĝis 50 kilogramojn. Li kapablas kuri pli ol 90

7 kilometrojn hore kaj ŝategas naĝi, kontraŭe al la leonoj, kiuj timegas naĝeblan akvon. Bhagavan Antle, ankaŭ en la foto, estas veterinaro kaj posedanto de la Instituto. Li diras ke leonoj kaj tigroj neniam seks-kuniĝas en la naturo ĉar ili estas malamikoj kapablaj mortigi unu la alian; kaj krome leonoj vivas ĉefe en Afriko kaj tigroj vivas ĉefe en Azio. Jam de antaŭ la dua mondmilito estis konataj leogroj naskitaj en zoo, laŭ homplana celo aŭ ne. Hodiaŭ ekzistas nedefinita kvanto en la mondo kaj de leogroj kaj de tigonoj. Tigono, tigro-leono, rezultas de tigro kaj leonino; pli eta ol leogro li havas fizionomion pli simila al tigro.

Aleks Kadar, tradukis P.B.



Leogro nomita Herkulo



Parko en Miami, Florido, Usono



Leogro kun maŝtrino



Komparo de la grandecoj de la leogro kaj homoj

8

## MI MORTUS SE NE LASUS MIAN AMON

SONETO N°66 DE ŜEKSPIRO  
William SHAKESPEARE (1564-1616)

### LXVI origine

1. Tired with all these, for restful death I cry,
2. As to behold desert a beggar born,
3. And needy nothing trimm'd in jollity,
4. And purest faith unhappily forsworn,
5. And gilded honour shamefully misplac'd,
6. And maiden virtue rudely strumpeted,
7. And right perfection wrongfully disgrac'd,
8. And strength by limping sway disabled
9. And art made tongue-tied by authority,
10. And folly, doctor-like, controlling skill,
11. And simple truth miscalled simplicity,
12. And captive good attending captain ill:
13. Tir'd with all these, from these would I be gone,
14. Save that, to die, I leave my love alone.

### Latine same

Mortem aveo fessus multis ego, nempe videndo  
Virtutem genitam pauperiore loco;  
Quidquid egens et inops, nitido spetabile cultu,  
Pollutamque pii pectoris esse fidem;  
Omnibus indignos auri fulgore nitentes,  
Tum sua virginibus nomina laesa probris;  
Improba vel santis obiecta, valentiaque arma  
Claudorum auspiciis debilitata ducum;  
Imperio siluisse artes; notumque medentes  
Inter, ab inscitis scita solere regi;  
Simplicibus verisque affigi nomen ineptis,  
Postque malum victrix optima capta trahi;  
His ego defessus cunctis abscedere vellem,  
Ni mihi sic esset destituendus amor.

Tradukis Alfred Thomas Barton

### Nederlande same

Dit alles moe smEEK ik de dood om rust;  
Want ik zag waardigheid een almoes vragen,  
En onbenul badend in praal en lust  
En goedertrouw vertrappt en stukgeslagen  
En maagdelijke deugd tot hoer gemaakt,  
En eregoud verleend aan vuiligheid,  
En zuiver recht vervalst en kromgepraat,  
En kracht verlamd door kreupel wanbeleid,  
En domheid met een doctoraat beloond,  
En kunst door brute macht monddood gemaakt  
En simple waarheid simpel weggehoond,  
En goedheid ingekoooid door Koning Kwaad;  
Dit alles moe ging ik het liefste heen,  
Liet ik niet door mijn dood mijn lief alleen.

Tradukis Arie van der Krogt

### France same

Lassé de tout, j'invoque le repos de la mort:  
lassé de voir le mérite né mendiant,  
et la pénurie besogneuse affublée en drôlerie,  
et la foi la plus pure douloureusement violée,  
et l'honneur d'or honteusement déplacé,

et la vertu vierge brutalement prostituée,  
et le juste mérite à tort disgracié,  
et la force paralysée par un pouvoir boiteux,  
et l'art baillonné par l'autorité,  
et la folie, vêtue en docteur, contrôlant le talent,  
et la simple loyauté traitée de simplicité,  
et le Bien captif serviteur du capitaine Mal...  
Lassé de tout cela, je voudrais m'y soustraire,  
si pour mourir je ne devais laisser seul mon amour.  
Tradukis François-Victor Hugo

### Germane same

Müde von alle *diesem* wünsch' ich Tod:  
Verdienst zum Bettler sehn geboren werden,  
Und hohle Dürftigkeit in Grün und Rot,  
Und wie sich reinste Treu entfärbt auf Erden,  
Und goldnen Ehrenschmuck auf Knechtshaupt,  
Und jungfräuliche Tugend frech geschändet,  
Und Hoheit ihres Herrschertums beraubt,  
Und Kraft an lahmes Regiment verschwendet,  
Und Kunst im Zungenbände der Gewalt,  
Und Schulensunn, der Vernunft entgeistert,  
Und schlichte Wahrheit, die man Einfalt schalt,  
Und wie vom Bösen Gutes wird gemeistert:  
Müde von alle dem, wär' Tod mir süß;  
Nur, daß ich sterbend den Geliebten ließ!  
Tradukis Johann Gottlieb Regis

### Hispane same

Ya harto. El descanso de la muerte  
Pediria, viendo al mérito mendigo,  
Y lo nulo e indigno engalanado,  
Y la pura confianza defraudada,  
Y la honra adjudicada erróneamente,  
Y la casta virtud prostituida,  
Y lo digno y perfecto envilecido,  
Y la fuerza vejada por deformes,  
Y el arte injustamente amordazado,  
Y al necio doctoral juez del talento,  
Y la simple verdad vuelta simpleza,  
Y el bien del prepotente mal cautivo.  
Ya harto de pesares, partiría,  
Mas si muero a mi amor dejaré sólo.  
Tradukisto ne konata (anonima)

### Itale same

Stanco di tanti eventi, pace alla morte invoco.  
Come vedere il Merito viver mendicando  
e amorfa Nullità ornata d'eleganza  
e la piú pura Fede iniquamente rinnegata  
e splendori Onori indegnamente conferiti  
e l'innocente Virtú volgarmente prostituita  
e la retta Perfezione indegnamente diffamata  
e Forza disarmata da Poteri vacillanti  
e Arte al silenzio stretta dalle Autorità  
e Follia, fatta dottore, controlar l'Ingegno  
e pura Verità con Semplicità confusa  
ed il Bene schiavo servir il comandante Male.  
Stanco di tutto questo, vorrei andarmene lontano,  
se non che morendo, lascerei il mio amore solo.  
Tradukis Patrizio Sanasi

## SONETO N°66 DE ŜEKSPIRO

Mi morton volas, ĉar min tudas jeno:  
Vidi Meriton almozulnaskita,  
Nululon, kiun vestas riĉmieno,  
Kaj puran Fidon triste sinperfida,  
Kaj hontan sorton de Honoro ora,  
Kaj virgan Virton perfortita krude,  
Kaj la Perfekton mise fi-notora,  
Kaj Forton, kiun regas lamo trude,  
Kaj Arton mutigita de Kontrolo,  
Kaj Lerton, kiun Stult' (doktore) pistas,  
Kaj simplan Veron misnomatan Folo,  
Kaj Bonon, kiu al Malbon' servistas.  
Tedite de ĉi ĉio, mi forpasus,  
Krom ke l' amaton mi en solo lasus.

Tradukis William Auld, Edistudio (Pisa), 1981

## MARO PORTUGALA

Ho sala maro, kiom da sal' via  
larmado 'stas portugalia!  
Pro navig', kiom da patrinoj ploris,  
kiom vane filoj preĝprovis,  
kiom da fianĉinoj sen par',  
pro via posedo, ho mar'!

Ĉu indis? Ĉio indas, se l'animo  
plenas je honor' kaj sublino.  
Dezirante transpasi Boĝadoron,  
nepre transpasu la doloron.  
Al mar' abisma Di' donis danĝeron,  
sed montris sur ĝi la ĉielon.

Fernando Pessoa, tradukis João José Santos  
Literatura reta revuo "La Karavelo"

## KARAVELO PORTUGALA

Navigu, Karavelo,  
De lando portugala,  
Al mia landa belo,  
al tero ĉebajkala.

Ekvidu, Karavelo,  
Belecon de Bajkalo,  
De mara akvarelo,  
De nuboj en la valo,  
De klaro en ĉielo,  
De akvo klarkristala,  
De ŝtormo ekribelo,  
De nubo blankvuala.

Sub romantiko vela,  
Mi fuĝas el banalo  
Al poezio bela,  
Al bela idealo.

Nikolaj Neĉaev, Siberio

## LINGVO PORTUGALA

Lingvon belan portugalán  
Naskis maro melodia,  
La prononcon idealan  
Naskis tajdo harmonia.

Por la lingvo aktualas  
Sonoj belaj, ritmo mara.  
Tiu lingvo min regalas  
Per beleco malavara.

Nikolaj Neĉaev, Siberio

## REVI PRI OLŬTINO

Mi volus reeĉeesti en Olŝtino;  
aŭskulti, el l' gotika katedralo,  
la ehon de la heroa analo  
pri sia kruckavalira destino.

Rigardi kiel la brika kastelo,  
enfermiĝinta en la historio,  
brilas pro arda, hela sunradio  
kiel la plej ruĝrubena juvelo.

Kiel vitra serpentó la rivero,  
rampas zigzage tra l' urbo, lekante  
tipajn reliefojn kaj reflektante  
miridaĵojn de himera apero.

Mia revado dancas kun la vento  
tra arabeskaj filigrano-stratoj  
de Mezepoko, el ŝtonaj brokatoj  
faritaj, kiel urba monumento.

Pro ĉio ĉi, estos mia destino,  
ĉeesti al l'agrabla kuneŝtado  
pere de l'esperantista movado,  
je Somer-Renkontiĝo en Olŝtino.

Alberto Garcia Orive, Bilbao

## CERBO ESTAS NUR SENPENSA FARĈO

Cerbo estas nur senpensa farĉo.

Oksikodoj kreskas en la marĉo.

L'marĉo kuŝas ie en la foro.

Oksikokoj mankas - kapdoloro.

Grizaj gruoj gurdas en malgajo.

Boataro frapas kontraŭ kajo.

Vento vunde foliaron levas;

Pro l' ŝvelanta farĉ' kranio krevas.

Daŭras ia morna malmateno.

En fridujo - vintro kaj malpleno.

Mankas eĉ guteto da biero.

Jam la kvina. Kokoĵ kokerikas.

Cerbofarĉo malfunkcias, strikas.

Kion, tamen, trinkis mi hieraŭ?

Miŝa Bronŝtejn, Tihvin, S.Petroburgo, Rusio

## OKCIDENTO

Per la du manoj - Ago kaj Destino -  
malkaŝis ni. Samgeste, al ĉielo  
starigas unu dian torĉon treman,  
l' alia senyualigas.

Cu 'stis la inta horo, ĉu la onta,  
la man' al Okcident' vualan ŝiris,  
anim' 'stis la Scienc', korp la kuraĝo  
de la malkaŝa mano.

Ĉu Volo, ĉu Hazardo, ĉu Tempesto\*  
la man' levinta la lumigan torĉon?  
L'anim' 'stis Di', la korp' Portugalio  
de l' mano ĝin gvidinta.

Fernando Pessoa, tradukis João José Santos

\* Ĉi tiu verso sintezas la tri teoriojn, kiuj strebas klarigi la kialon, pro kiu Pedro Álvares Cabral, en jaro 1500, malkovris Brazilon: "Volo" - eble la portugaloj jam sciis pri la ekzisto de tiu teritorio kaj planis ĝian okupon; "Hazardo" - eble la malatento de la portugalaĵ navigistoj ĝin trovis; "Tempesto" - eble tormenta vetero aŭ tempesto devigis Cabral for de la marvojo al Hindio, lia ŝajna vojaĝo-celo. La tri vortoj, kiuj simbolas la tri teoriojn, estas majuskle skribitaj, ĉar kiel diras la poemo, iel ajn, tie estis la mano de Dio.

## "HEROLDO" PIRATE 10 JAROJN

1. Nia neprofitcela societo "Heroldo de Esperanto", ricevis la samnoman gazeton de la fondinto Teo Jung en 1960 kaj daŭrigis ĝian eldonadon ĝis 1996 sub la 36-jara redaktado de Ada Fighiera-Sikorska.

2. En 1996 nia asocio transdonis la gazeton al la Itala Interlingvistika Centro (Milano) sub la nepra kondiĉo - trifoje ripetita en la protokolo de la 17-a de julio 1996, subskribita ankaŭ de Ada en drama viv-cirkonstanco, - pri "**respekto de la tradicio kaj principoj**" de la gazeto. La tradicio kaj principoj estis, i.a.: la gazeto havas ĉefe informan karakteron pri la disvastigo de Esperanto; ĝi estas sendependa kaj supertendeca pri movadaj ideologioj kaj internaj konfliktoj.

3. Kiel ĉiuj povas konstati, la supraj kondiĉoj neniam estis respektataj de la nova redakcio. Jam fine de 1966 en la "raŭmismo" gazeto "Literatura Foiro" (LF) oni povis legi, ke post la akiro de "Heroldo" la raŭmismoj (malgranda tendenca grupo, preskaŭ nur eŭropa, kiu opozicias al la ĝenerala Esperanto-Movado, negative juĝas la Universalajn Kongresojn kaj proponas alternativan Esperanto-komunumon) posedas du gazetojn: la diritan LF kaj Herodon mem. Konforme al la supre citita deklaro, la novaj redakciaĵoj, kunaŭtoroj de la rezolucio de Raŭmo (Finnlando) en 1980, senrajte transformis la gazeton en personan organon de **raŭmismo ideologia propagando** kaj siaj privataj kvereloj; en ĉiu numero la redakciaĵoj geedzaj daŭre aperigadas tendencajn artikolojn sub propra nomo, sub aliaj kromnomoj aŭ prunteprenitaj aŭ elpensitaj subskriboj (Valerio Ari, Giorgio Silfer, Nicolas Vanof kaj aliaj estas la sama persono; ankaŭ pluraj surpaperaj E-societoj estas ligitaj al li). La lukto de la nuna redakcio kontraŭ nia Movado, kontraŭ personaj kontraŭuloj kaj kontraŭ aliaj Esperanto-gazetoj eskaladis ĝis senprecedence granda nombro da artikoloj kun ripetitaj en ĉiu numero aludoj, klaĉoj, pikoĵ, subfosoj, rezolucioj, manifestoj, polemikoj, atakoj, provokoj, venĝoj kaj personaj skandaloj; sen paroli pri la utiligo de la gazeto fare de la redaktoro por propagandi sian propran kandidatiĝon ĉe Akademiamaj elektoj.

Ĉio tio semas malharmonion inter la esperantistoj kaj montras, ke "Heroldo" estas nun redaktata ekzakte laŭ la malaj principoj ol tiuj, kiuj inspiris Teo Jung kaj Ada, ambaŭ amataj, pacemaj, lojalaj agantoj en nia Movado dum entute pli ol 70 jaroj. Evidente, la raŭmismoj rajtas diskonigi siajn teoriojn, sed ne rajtas misuzi tiucele Heroldon.

4. Dum la pasintaj du jaroj nia societo vane provis per dekoj da privataj kaj publikaj atentigoj konvinki la novan redakcion de la gazeto respekti la fundamentan kondiĉon ligitan al la transdono de la gazeto, t.e. la respekto de ĝiaj **tradicio kaj principoj**.

5. Ĉar la supre citita kondiĉo de la transdono estis kaj estas malrespektata de la novaj eldonantoj, la

transdono mem fariĝis nevalida kaj aŭtomate nuligis. Tial, nia Societo decidis repreni ĉiujn siajn antaŭajn rajtojn ek de 31-a de decembro 1999, dato je kiu -laŭ sciigo en la kolofono de la nuna "Heroldo"- finiĝos la deĵoro de la nuna redaktoro. Ek de nun, la eldon- kaj vendoraĵoj de la nacilingvaj lernolibroj eldonitaj de nia societo iras senpage al landaj asocioj de la koncernaj lingvoj.

6. Fine, per la nuna komunikado la subskribinto nuligas sian alvokon (lasta numero de "Heroldo" de 1996), en kiu li petis abonantojn de "Heroldo" resti fidelaj al la nova redakcio. La esperantistoj laboru por la disvastigo de Esperanto, **for de ideologioj**, kiuj senhalte semas malkonkordon per la mono de la abonantoj de la nuna "Heroldo".

7. Nia societo sendos al ĉiu petanto kopion de la supre menciita protokolo de 1996 pri la transdono de "Heroldo" kaj la koncernan postan korespondadon.

Torino, la 1-an de oktobro 1998  
Bonvolu publikigi, la 15-an de januaro 2009  
Gian Carlo Fighiera, eksa prezidanto de EBG  
Via Sandre 15, 10078 VENARIA R.(TO) Italia



Nia eksa prezidanto Fighiera kun la ĉefa redaktoro en Vilnius

## STRATSIGNA FUŜTRADUKO

Kiam respondeculoj petis la kimran tradukon de voĵsildo, ili pensis, ke la ricevita respondo estas tiu, kiun ili bezonas. Bedaŭrinde, la retroŝta respondo al la Konsilio de urbo Swansea diris en la kimra: "**Mi ne estas en la oficejo nunmomente. Sendu dokumenton tradukotan**". Tiela teksto sekve aperas (anstataŭ traduko) sub la angla versio kiu baras vojon al kamionoj apud superbazaro.

eventeo.net



## VOJAĜO AL KRIMEO KAJ AROMA JALTO

Printempe 2008 mi decidis fari tute specialan vojaĝon. Mi sciis ke la vojaĝo estos tre streĉa, sed interesa kaj plena de okazontaĵoj. Mi diris al mi mem, ke ĝi estas pli bona testo de la sanstato ol iri al la kuracisto. Se mi revenos en bona sanstato tio signifos ke mi estas bonsana!

Por ne troigi la streĉon mi flugis de Stockholm, kie mi loĝas, al Gdansk, de kie la vojaĝo startas per buso. Por atingi la flughavenon mi vojaĝis dum unu kaj duona horo tra mirinda novsomera regiono sude de Stockholm.

La flugvojaĝo daŭris unu horon dum kiu ni sekvis la orientan marbordon de Svedio, vidis la insulon Oland kaj Kalmar, kie mi antaŭe loĝis. Mi ekvidis la polan marbordon kaj surteriĝis sur Lech Walensa flughaveno. Tie Daniela atendis min. Mirakle! Ni iris per buso al la centro de la urbo Gdansk al la hejmo de Daniela. Mi loĝis ĉe ŝi dum kelkaj noktoj. Ni promenis tra la urbo, kiun mi jam kelkfoje vizitis. Gdynia kreskis de malnova fiŝista vilaĝo kaj ricevis urbajn privilegiojn nur en la jaro 1926. Tiu urbo havas la plej grandan havenon en Pollando kaj la maro tre gravas en la urba vivado. Pluraj belaj statuoj staras sur la Strandpromenadejo i.a. iu pri Joseph Conrad, kiu naskiĝis en la urbo.



Kerstin Rohdin en Aroma Jalto, Majo 2008

Post bongusta manĝo en novrenovigita restoracio ni iris al la haveno por ĝui kapuĉinon. Oni larĝigis la strandon per amaso da sablo dum oni profundigis la havenon. Malantaŭ kie ni sidis staris montodorso kun bela fagarbaro. En la maro antaŭ ni etendiĝas la longa duoninsulo Hel, kiu protektas la havenon. Sur ĝi abundas vivo de birdoj kaj plantoj. Dum la lastaj ses – sep jaroj, dum kiuj mi ne vizitis Pollandon, urboj kaj ĉefosejoj tre modernigis. Ni vizitis plurajn "galeriojn" pluretaĝajn kun multege da varoj, modernaj vestoj, elektronikaĵoj, ekzotika manĝaĵo, inter ĉio vi povas elekti.

La postan tagon ni vojaĝis al Bygdgoszcz, trajnovojaĝo kvinhora, denove ĝuante belan printempan regionon. Oni petis min fari "rakonton" pri Svedio al studentoj kiuj ekzameniĝas al la tiea Turisma lernejo. Interesa afero! Revojaĝis al Gdynia dum bela krepusko.

Nun estas tempo prepari sin por la longa vojaĝo suden al suda angulo de Eŭropo – Krimeo kaj Aroma Jalto. Nicoline (svedino), Daniela kaj mi "tiris" niajn bagaĝojn surradajn al la stacidomo, kie atendis la aŭtobuso. Ni enbusiĝis kaj ekis al

11

Varsovio por tie trovi alian buson kiu ankaŭ kuniros. Denove ni travojaĝis plej belan printempan regionon kun verdantaj florantaj arboj, ĝis ni parkis ĉe la fama Kulturdomo en la centro de Varsovio. Post mallonga halto en Lodzo kaj kiam la krepusko falis ekster la buso ni ekis al la limo de Ukrainio. Tio estas la limo inter EU kaj landoj ekster EU. Tio signifas ke estis tre komplika trairo de la limo inter Pollando kaj Ukrainio. Dum kvar noktaj horoj ni ĝuis la laboron de la doganistoj. Kiel en la malnova tempo ili kolektis ĉiujn pasportojn, forprenis ilin kaj la penso aperis en la kapo: "Ĉu vi jam ajn revidos ilin?" Tamen post kvar horoj kaj post kiam 80 personoj maltrinkis, denove trinkis, aĉetis frandaĵojn, la aŭroro vekis nin, niaj busoj rulis la unuajn kilometrojn en Ukrainio.

Post plurhora vojaĝo tra ebenaĵo ni alproksimiĝis al Kiev, la ĉefurbo de Ukrainio. Laŭ kio ni lernis en niaj lernolibroj pri historio la vikingoj fondis la urbon dum la naŭa jarcento. La regiono nomiĝis Kievrus kaj estis mezepoka princoŝtato en la centraj partoj de la valo de Dnepr. Tio regno estis kunigaĵo de orientslavaj agrarkomunumoj kaj nordiaj vikingoj. 988 la princo Vladimir I enkondukis la ortodoksan kristianismon. La mongola konkero dum 12-13-aj jarcentoj faligis la Kievregnon en 1240. La mongoloj regis ĝis la lando estis konkerita de Pollando en 1340 kaj de Litovio en 1362. Fariĝis malinterkonsento inter la katolika kaj la ortodoksa religioj. En 1654 la plej granda parto de Ukrainio fariĝis parto de la rusa imperio kaj iĝis ortodoksa centro de la regiono. Meze de la 19-a jarcento Kiev iĝis centro por la unua nacieca ukraina movado. Post 1917 oni batalis por sendependa Ukrainio. Ukrainio estis soveta respubliko de 1943 ĝis 1991, kiam ĝi fariĝis memstara ŝtato.

Ni vizitis Sofiakatedralon konstruitan en 1017, unu el la plej unuaj ekzemploj de rusa eklezia arkitekturo. La preĝejo estas bele renovigita kun la centra kupolo orumita kaj la muroj brile blankaj. La preĝejo situas sur altaĵo super la rivero Dnepr kun bela elrigardo super la valo. En la sama religia centro ankaŭ troviĝas la fortigita Petjerskamonahajo fondita en 1050 kaj Uspensky katedralo de 1070-aj jaroj. La regiono ĉirkaŭ la urba ĉefstrato Ĥresjtjatyk estas renovigita en monumenta stilo ĉirkaŭita de arboj. Carmaj junulinoj montris al ni la metiistajn kvartalojn en la malnova urbo.

Post la konatiĝo kun tiu bela urbo la buso denove turnis suden direkte al Krimeo. Ni vespermanĝis en bela grandbieno, Palata Sofievka, kiu estis konstruita de pola nobelo en la dekoka jarcento. Nun estas tempo por ankoraŭ nokta veturado al la ankoraŭ malproksima Krimeo kaj Jalto. Kiam heliĝis kaj ni iom vekigis ni gvertis ĉirkaŭ ni por trovi La Nigran Maron kaj Krimeon, sed ankoraŭ restis longa vojo. Tamen ĉirkaŭ la lunĉotempo ni alproksimiĝis al la suda bordo de Krimeo kaj enveturis Jalton apud la fama trolibuso, kiu veturas inter la urboj laŭ la bordo. Laŭdire tiu estas la plej longa trolibuslinio en la mondo. Estis la 1-a de majo kaj la feste vestitaj homoj abundis surstrate.

12

Sube ni vidis la maron Nigran kaj mia fantazio apenaŭ suffiĉis por kompreni ke mi estas ĉe la maro Nigra kaj Krimeo. La buso veturis supren laŭ la monta deklivo al nia kurscentro. Belaj montopintoj ĉirkaŭis nian kursejon. Ĉirkaŭ ni kreskis pinioj, cipresoj, magnolioj. Sur la korto troviĝis akvobasenetoj kun oraj fiŝetoj. De la verando kie okazis niaj lecionoj ni vidis ĉiun belecon de la naturo kun arboj inter la montaro. Mirakle havi siajn lecionojn subĉiele.

Nia studgrupo estis instruita per "intelektaj ludoj" t.e. diversaj vortludoj. Kelkfoje mi parolis kun nia instruistino, Tatjana Auderskaja ekster la lecionoj. Ŝi rakontis multon al mi pri la lando kaj ĝia historio. Okcidente kaj sude Krimeo estas ĉirkaŭita de la Nigra maro, nordoriente de Azova maro. La norda parto de la duoninsulo konsistas el ebenaĵo kaj stepo. Sude la Krimeaj montoj levigas kelkloke ĝis 1500 metra alteco. La suda parto havas mildan klimaton kaj mediteranean kreskaĵon. Abundas vitejoj sur la deklivoj. De pratempoj multaj diversaj popoltriboj loĝis sur Krimeo. Troviĝas restaĵoj de setlejoj en grotoj ekde paleolitika periodo. Dum la bronza periodo Krimeo estis proksima al norda Kaikazio. Dum la frua fera epoko Krimeo apartenis al la regno de la skitoj. Antaŭ dekoj da jaroj oni montris miraklan ekspozicion en Svedio pri la oro de la skitoj. 600 jaroj a.Kr. Krimeo estis koloniita de ionanaj grekoj. Ili fondis i.a. Theodosia. Dum 480-aj jaroj a.Kr. la duoninsulo kuniĝis kun la heleno-skita dinastio kaj fariĝis tre grava ŝtato, kiu restis ĝis la Malfrua Antikvo. Dum la 3-a jarcento p.Kr. la duoninsulo iĝis parto de la sudrusa regno de la ostrogotoj. Kelkaj individuoj de tiu popolo vivis en la montaro ĝis la 18-a jarcento, grupeto de etnaj germanoj, malgraŭ ke la invadoj de la hunoj forpelis multaj diversaj popoloj de suda Krimeo. La mongola Ora Hordo konkeris orientan Eŭropon dum la 13-a jarcento. Tiam turk-mongolaj triboj ekloĝis sur Krimeon. 1440 kreis la prajdoj de la mongoloj, la islamaj krimtataroj la Krimkhanato, kiu estis parto de la Osmana Regno. Dum la fino de la 17-a jarcento la rusaj caroj interesiĝis pri Krimeo kaj Katarina II, la Granda, pligrandigis la rusan imperion al la Nigra maro. En 1783 Krimeo fariĝis parto de la rusa imperio kaj la mararmeo de la Nigra maro lokiĝis en Sevastopol. La translokiĝintaj rusoj forprenis la terposedaĵojn de la Krimtataroj. Laŭdire la tataroj kunlaboris kun la germanoj dum la dua mondmilito kaj Stalin forpelis ilin al Sibirio. Ni vizitis tatarvilaĝon, al kiu la tataroj nun revenas post la forpelo. Troviĝis bela muzeo kiu montris la palacon de la Ĥano. Mi aĉetis cd-diskon por revivi la viziton kaj denove rigardi la belajn meblojn kaj teksaĵojn. Apud la palaco estis moskeo, kiun ni vizitis.

Ni faris plurajn ekskursojn laŭ la bordo de la Nigra maro, super la belaj sovaĝaj montoj. Ili ne estas tiel altaj sed tre pitoreskaj. Kie ajn en suda Krimeo oni estas ĉirkaŭita de ili. Ni vizitis Sevastopol, kie troviĝas la rusa Nigra mara floto.

Ĉie ajn laŭ la Nigra maro oni vidas imponan akvosurfacon kie nenio videblas je la alia flanko. Ne aspektas same kiel la insularo apud Stokholmo.

En Sevastopol ni vizitis grandan "panorama-ekspozicion" pri la Krimea milito. Oni konstruis grandan rondan domon kun pentraĵoj kaj statuoj kiuj priskribas al militon 1853-56. Teruraj sed tre imagoplenaj bildoj pri la detruoj de la milito. La tiel nomata Krimea milito estis unu el pluraj militoj inter la kreskinta rusa imperio kaj la disfalinta Ottomana regno. Katarina I ekkonstruis la pligrandigon de Rusio por atingi limojn ĉe la sudaj maroj. La orienta angulo de Eŭropo estis maltrankvila, Balkano, Turkio, Meza Oriento (same kiel hodiaŭ). La ekflamiĝinta fajrero tiam same kiel nun estis religiaj malinterkonsentoj en Palestino. Rusio volis protekti la ortodoksulojn, Francio la katolikojn. Post la komenco de la milito Granda Britio ankaŭ enmiksiĝis, ĉar la komerco sur la maroj estus minacata se la ekvilibro de potenco ŝanĝiĝus.

La Krimea milito ankaŭ estas konata pro tio ke pluraj flegistinoj helpis al la vunditaj soldatoj. Ni konas pri Florence Nightingale. Ŝi apenaŭ estis konata de la rusa gvidanto, kiu anstataŭe rakontis pri konata rusa flegistino, kiu laŭ ŝi helpis pli efektive. Oni vidas kiel altaj estas la kulturaj baroj inter niaj diversaj partoj de Eŭropo. Aliaj novaĵoj dum la milito estis fervojo, fotilo, militkorespondanto, telegrafo kaj kompreneble novaj armiloj.

Caro Nikolaj II mortis kaj la pacprocedo devis rapidiĝi. Lia posteulo estis la pacamanta caro Aleksandro II. Li devis reformigi la rusan socion kaj estis tiu caro kiu finis la servuton en 1861. Tiuperiode estis grandaj ŝanĝoj en multaj landoj de Eŭropo, kiam la talentula rezervo liberiĝis.

En 1945 post la dua mondmilito Krimeo denove estis enmiksita en la grandpolitiko. Ni vizitis la palacon Livadia kaj vidis la ĉambrojn, tablojn kaj seĝojn kie Churchill, Roosevelt kaj Stalin decidis kiel la estonteco de Eŭropo evoluos. Germanio estu dividita en kvar okupacionojn sub kontrolkomisiono. Pollando perdis teritorion oriente al Sovetunio kun Lvov kaj estis rekompencita okcidente kun Stetin.

Ni vizitis plurajn kastelojn kiuj situas mirinde inter la montoj aŭ proksime de la maro kun grandioza elrigardo. La kasteloj apartenis al diversaj caroj aŭ rusaj nobeloj. Ankaŭ multaj verkistoj kaj artistoj feris aŭ resaniĝis sur suda Krimeo. Mi nur mencias kelkajn. Puŝkin, kiu loĝis en la pitoreska novrenovigita feria urbo Gurzuf sur roko super la maro, Tolstoj, Mickiewicz kaj Ĉehov kiu eĉ havas tute novan statuan sur la Strandpromenadejo en Jalto. Tie li staras kune kun "La damo kun la hundo". Multaj interesaj personoj konstruis siajn kastelojn kaj domojn en tiu sovaĝa kaj bela parto de la mondo. Unu konstruis sian loĝejon "Hirunda Nesto" sur roko en la maro. Nun ĝi estas luksa restoracio. Mallonge for de Jalto situas la malnova, mirakla Botanika Ĝardeno "Nikita" kie abundas ekzotikaj malnovaj arboj. Tatjana Auderskaja estis lerta gvidanto. Bedaŭrinde mankas mono al la ŝtato. Oni devas forlui diversajn partojn el la parko al privatuloj por prizorgi la parkon. La planto glicino, kiu estis la simbolo por Krimeo abundis tie, kvankam oni forhakis multon.

Mi partoprenis kelkajn tre interesajn promonadojn en la malnovaj ankorau ne renovigitaj partoj de la urbo Jalta. Ni vidis la malnovan arkitekturon kun specialaj vitrajverandoj kaj ornamaj lignoskulptaĵoj sub la randoj de la tegmentoj. Oni rakontis ke tiu arkitekturo portas tipan influon de la tata kulturo. Plurloke oni pentris kaj renovigkonstruis la domojn. Proksime de la Strandpromenadejo estis granda foiro kun multaj ekzotikaj legomaj kaj fruktoj ankaŭ konservajoj en vinagro aŭ sukero.

Vespero kaj ankaŭ dumtage oni prezentis interesajn esperantoprogramojn – prelegojn, naturfilmojn pri la marĉoj de la Nigra maro kun esperantoparolo, multe da muziko kaj kantado. Plej oni amis la kantojn verkitaĵojn de rusaj komponistoj, kiuj ofte partoprenis en Aroma Jalta, sed kiuj nun loĝas en Stokholmo. Mi prezentis unu el la monologoj, kiujn Harold Brown verkis.

La semajno pasis rapide kaj alvenis la tago de foriro. La buso iris laŭ la Nigra maro pasis la regionojn kun la fekunda nigra tero, iris super la stepoj al Odessa, la granda urbo ĉe la Nigra maro, la plej granda havenurbo, centro por komerco kaj komunikado. Odessa estas konstruita sur tata setlejo en 1415. En 1794 ekkonstruiĝis la haveno kaj la moderna urbo. Familiano de Kardinalo Richelieu fuĝis de la franca revolucio al Odessa, kiu jam altiris al si internacian vivon, fondis la urbon. Li statusas kiel romiana gvidanto surĉevalo rigardante super la havenon kiun li kreis. Apud la statuo komenciĝas la fama stuparego, kiu videblas en la filmo "Kirasŝipo Potemkin" de Eisenstein, kiu priskribas la ribelon kaj la revoluciajn maltrankviligojn kun la revolucio 1905. Odessa estis grave damaĝita dum la dua mondmilito, sed nun la centro de la urbo estas bele rekonstruita en unueca arkitekturo ĉirkaŭ la Operejo kaj la placoj. Bela urbo por ĉirkaŭvagadi. Vidi la stuparegon aŭ de supre de apud la statuoj aŭ de malsupre de apud la maro estas grandiozaj travivaĵoj. Promeni sur la moleo, rigardi super la senfina akvosurfaco estas neforgesebla travivaĵo.

Denove nokta vojaĝo, sed nun norden al la urbo Lvov/Lviv. Tie ni loĝis ĉe privatuloj, maljunaj polinoj. Certe estis interesa por la poloj en la busoj renkonti maljunajn gepolajn, kiuj restis je la alia flanko de la limo post la dua mondmilito. Ni vizitis grandan polan tombejon kun multaj monumentoj de la tempo antaŭ la dua mondmilito. Ni ĉirkaŭpromenis en la urbo vidis la Operejon, la placojn kaj preĝejojn. Tiu ĉi urbo ne aspektis same malfermata kiel la urboj ĉe la maro. Daniela, mi kaj ankorau kelkaj aliaj manĝis en restoracio, kiu aspektis kiel "Kneipe", kie la ribeluloj kolektiĝis dum pli fruaj liberigmovadoj. Etoso! Sajnis ke estas populara ejo por junularo.

Ni revenis al Gdansk ĉirkaŭ la unua horo nokte post sperto de la Varsovia "trafik-kaĉo". Mi restis ankorau unu tagon en Gdansk por travivi kelkajn horojn ĉe la Balta Maro kaj ĝi bonan feston ĉe esperantistino en Gdansk. Poste estis tempo por reflugo al Stokholmo, kie mi estis bonvenigita de pluvego kaj malvarmo, sed dum la tuta vojaĝo ni ĝuis belan veteron! **Kerstin Rohdin el Stokholmo, Svedio**

## PAPERAJ MEMBROJ ŜVELIGAS HUNGARIAN ESPERANTO-ASOCION

Laŭ lastatempaj statistikoj publikigitaj de UEA, la kvanto de asociaj membroj en Hungario dum la pasinta jaro deklariĝis, de 142 al 1.348. La fulma kresko en Hungario grave beligis la ciferojn de UEA, kiu daŭre povas fieri pri pli ol 11.000 asociaj membroj. La efektiva situacio en Hungario tamen estas alia ol ŝajnas indiki la belaj ciferoj. La movado estas dividita en du malamikajn frakciojn, la lasta sidejo de Hungaria Esperanto-Asocio iĝis seksgvatejo, mankas spuroj de la supozeble mil-membra aktivado, kaj apenaŭ videblas la asertata Esperanto-rilata agado de la freŝe fonditaj surpaperaj fondaĵoj, gajnintaj signifajn ŝtatajn subvenciojn.

Sufiĉe fidindan indikon pri la prestiĝo kaj financoj de ajna asocio donas la stato de ĝia oficejo kaj ties situo. En Hungario la landa asocio de UEA en la 1980-aj jaroj ĝuis favorajn kondiĉojn. Unue la sidejo de Hungaria Esperanto-Asocio situis en flankstrato, sed sufiĉe centre de Budapeŝto, en la strato Kenyérmező, sed baldaŭ ĝi translokiĝis al majesta palaco en la kastela kvartalo de Buda. Tie kvardeko da dungitoj de HEA okupis kvindek metrojn da koridoro en eksa ministerio.

Post la reĝimsanĝo HEA retretis al negranda ĉe-korta lokalo sub la Biblioteko Fajszki, tamen en tre prestiĝa avenuo preskaŭ fronte al la Operdomo. En la lastaj jaroj restis al HEA nur deko da kvadratmetroj, nome la librovendeja truo ĉe la iama ĉefsidejo en la strato Kenyérmező.

En marto 2008 la asocio ĉesis okupi ajnan fizike difineblan lokon. Oni vendis la lurajton de la lasta ejo por malpli ol 8.000 eŭroj al la najbara seksogvatejo, kaj en la Jarlibro de UEA kiel adreso de HEA nun estas indikita poŝtkasto.

**Pli aro en la negativa evoluo** de HEA estas multjara interna konflikto. Post la morto de la ĉefa oficisto de la asocio, Oszkár Princz, en la jaro 2004, la agado kolapsis. Neniu prizorgis la pagadon de fakturoj, la telefono kaj elektro de la sidejo estis malŝaltitaj, kaj fine de la jaro la asocio proksimis al bankroto.

Tiam estis elektita nova estraro, en kiu pri financoj respondecis László Szilvási, ankaŭ konata kiel eldoninto de la gazeto *Eventoj*. La financa situacio estis ordigita, sed ŝajne pro interna konflikto en la estraro la tiam prezidanto de HEA, György Nanovfszky, akuzis László Szilvási pri neleĝa prizorgo de la asocia financo.

Pro la akuzoj la Esperanto-movado en Hungario spertis skismon, kiam ne nur la Esperanto-Asocio Eventoj sed ankaŭ Hungara Esperanto-Junularo ekŝiĝis el HEA. Polica esplorado daŭris preskaŭ jaron, kaj la akuzoj kontraŭ László Szilvási estis vaste diskonigitaj de HEA ankaŭ tra la kanaloj de la Esperanta Civito, kiu aparte akcentis, ke László Szilvási estas ne nur "sub enketo de la fiskaj aŭtoritatoj" en Hungario, sed ankaŭ "persona non

14

grata" ĉe la Civito, en kiu membras György Nanovfszky.

Eventuale havas rilaton al la skismo en la hungaria movado ankaŭ la fakto, ke la estraro kaj komitato de UEA ĉi-jare ne akceptis la kandidatigon de György Nanovfszky kiel honora membro de UEA, entreprenitan de HEA. Kutime tiaj kandidatoj ne estas publike diskonigitaj, sed ĉi-foje la rusia revuo *Scienca kaj Kulturo* dediĉis al la kandidatigo de György Nanovfszky tutan paĝon. Kiel honora membro estis tamen elektita nur Simo Milojević.

La polica esplorado montris, ke neniam misagoj okazis, kaj en marto 2008 dum jarkunveno de la asocio ĉiuj estraranoj de HEA, inkluzive de György Nanovfszky, publike pardonpetis al la akuzito. La pardonpeto tamen ne kondukis al repaĉigo, nek estis diskonigita de HEA, kaj plu daŭras la kompleta skismo de la landa movado.

**Kompare kun tiu evoluo** iom surpriza estas la subita enorma kresko en la membraro de HEA, raportita al UEA. Ekde la 1990-aj jaroj la raportita membronombro de HEA ĉiam fluktuis ĉirkaŭ 130, sed ĉi-jare HEA subite pagis al UEA kotizon por pli ol 1.300 membroj. Kiam la statistikaĵoj estis publikigitaj en *Libera Folio* komence de septembro, László Szóke nome de HEA, klarigis de kie aperis la favoraj ciferoj:

- Temas pri neniu stranga afero, nur pri tio, ke Hungaria E-Asocio (HEA) provas reorganizi sin, kaj sukcesis aligigi pli ol 35 diversajn E-organizaĵojn, funkciintajn ĝis nun pli-malpli izole dise en la lando. Tiuj organizaĵoj antaŭe ne estis membro-asocioj de HEA, kaj tra ĝi de UEA.

En la realo tiuj novaj fondaĵoj kaj lokaj societoj estis fonditaj nur en la lastaj 1-2 jaroj fare de József Baksza, prezidanto de Humana Eŭropa Asocio, kaj la plej multaj el ili havas suspektinde vastan liston de agad-celoj: de kontraŭdroga preventado kaj eŭropunia integro tra sana vivmaniero kaj funkciigo de Pasporta Servo, ĝis interregiona agado kaj helpo al diverstipaj handikapitoj.

Tiuj novaj organizaĵoj estis aligitaj al HEA kiel membro-organizaĵoj kaj "fakaj Esperanto-fondaĵoj" - eĉ tiel, ke ne estis prezentitaj iliaj statutoj, kaj ne ĉeestis iliaj reprezentantoj. La novaj fondaĵoj gajnis plurajn milionojn de forintoj kiel ŝtatan projektan subvencion, sed rezultoj apenaŭ videblas en Esperanta tereno.

**Centra organizaĵo** en la reto estas Humana Eŭropa Asocio, kiu kunagordas la agadon de tiuj fondaĵoj, kaj fakturas diversajn servojn por ili, kiel verkado kaj kompilado de konkursaj dosieroj, librotrenado, helpo en la komuna realigado de la gajnintaj projektoj, ktp. Tiun asocion estras József Baksza.

Unu el la ŝtataj monsubvencioj, kiujn gajnis Humana Eŭropa Asocio en la jaro 2007, estis celita ĝuste por "subteno de membrokotiĝoj en internaciaj organizaĵoj", kaj valoris 290.000 forintojn (proksimume 1.100 eŭrojn). La kotizo de aligita membro de UEA por Hungario estas 215 forintoj, do la sumo sufiĉis precize por tiuj 1.348 kotizoj, kiujn pagis HEA ĉi-jare.

Humana Eŭropa Asocio do sole dum la jaro 2007 sukcesis havigi al UEA 1.100 eŭrojn, evidente el la ŝtata buĝeto de Hungario, kaj al si meme pli ol 2.200 eŭrojn por "subteno de kunlaboro inter hungariaj kaj internaciaj organizoj". Ne klaras kiom da subvencioj ricevis la aliaj, surpaperaj fondaĵoj kaj asocietoj.

En la jarkunveno de HEA la 15-an de novembro József Baksza ne rekandidatis por la posteno de prezidanto. Li klarigis, ke li jam en majo demisiis interalie pro tio, ke li paralele havas postenon en ŝtata komisiono disdonanta monsubvenciojn al asocioj, kaj ke tiujn duoblajn taskojn oni povus konsideri konfliktantaj inter si.

*Libera Folio* turnis sin al la retroŝta adreso de HEA por ricevi pliajn informojn pri la aranĝoj ĉirkaŭ la ŝtataj subvencioj, sed ne ricevis respondon.

**Laŭ la ĉi-jare anoncita** memborkvanto Hungaria Esperanto-Asocio subite estas unu el la plej grandaj landaj asocioj de UEA. Ĉar la membronombro superas mil, HEA rajtas je ne unu, sed du reprezentantoj en la komitato de UEA. Krom HEA du komitatanoj A havas nur la landaj asocioj en Ĉinio, Francio, Germanio, Italio kaj Japanio.

La Centra Oficejo de UEA neniam ricevas informojn pri la nomoj de la aligitaj membroj, nur informon pri ilia nombro. Laŭ tiu nombro la landaj asocioj devas pagi kotizon al UEA. Sed eĉ se HEA efektive ne havas tiom da aktivaj membroj kiel ŝajnas laŭ la ciferoj, tio ne estas granda problemo laŭ Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA.

- La Centra Oficejo ne povas kontroli la anoncitan nombrojn kaj eĉ estas malfacile difini, kio tiurilate estas ĝusta kaj kio ne. La nocio "membro" ege varias de lando al lando. Se vere iu asocio pagus al UEA por pli granda nombro ol ĝi devus, tio ne falsus la statistikon de UEA sed iom kompensus tiujn membrojn en iuj aliaj landoj, por kiuj iliaj asocioj ne pagas, kvankam ili devus. Pli-malpli ĉiujare post la aperigo de la statistiko de UEA iuj atentigas min pri supozataj eraroj, ĉar iliaj asocioj havas eĉ multe pli da membroj ol indikite en la statistiko. Sendube ili pravus, sed ankaŭ la statistiko pravus, ĉar ĝi baziĝas sur pagitaj nombroj. Libera Folio

## BONVENON EN ĈAMPANJO

La Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto en Francio ĉi-jare okazos en la urbo Troyes, de la 7a ĝis la 11a de majo 2009. Troyes estas ĉefurbo de departemento Aube kaj historia ĉefurbo de Ĉampanjo, kiel montras multaj atestaĵoj. La kongreso okazos en vasta kaj agrabla loko: **"Centre Sportif de l'Aube" - 5 rue Marie Curie - 10000 TROYES**. Vi trovos ĉion necesan por studema laboro: interretan konekton en la kongresaj salonoj, kaj memservan restoracion. Diversa kaj alloga programo estos proponata: Vizitoj en la historia urbocentro de Troyes; Prelegoj kaj spektakloj; Unutaga ekskurso kun vizito en ĉampankelo. Programo, informoj kaj aliĝilo ĉe retejo: <http://esperanto10.free.fr>. Aliĝo estas senpaga por eksterlandanoj. Bonvenon en Troyes! Claude Nourmont, Vicprezidanto de UEA

## VORTENIGMOJ

Tra definoj vi malkovru la vortojn kun tri sinsekvaj literoj:

### "ZIN"

1. Kriisto islama. (ekzemplo: mueZINo)
2. Ilustrita revuo.
3. Brile malhelruĝa.
4. Io kio jam okazis.
5. Filino de geonkloj.
6. Maŝinoj trinkas ĝin.
7. Elemento kaj metalo.
8. Al si prenas ŝi vivkunulon.
9. Uzata por spici manĝaĵojn.
10. Aŭtomobilo ne por simplaj homoj.
11. En ĝi oni fabrikas metalproduktaĵojn.
12. Tie oni gajnas aŭ malgajnas aro da mono.

### "KAT"

1. Juristo. (ekzemplo: advoKATo)
2. Grava preĝejo
3. Hejma besteto.
4. Subtera kaŝejo.
5. Nun skribata libro.
6. Nazelfluo.
7. Speco de velŝipo.
8. Malbona naturfortega okazintaĵo.
9. La tuto de varoj vendataj kaj acetataj.
10. Unu el la plej altaj ĉefurboj en la mondo.
11. Tabelo de objektoj kiuj aperas en iu ordo.
12. Nomo de: nukso, spico, vino, vinberoj.

13. Himero de muso kaj kato.
14. Klaso de similaj eroj.
15. Iaspeca kristano.
16. Plirapidigi kemian reakcion per iu substanco, kiu ne partoprenas en ĝi.

### "KOR"

1. Besto zodiaka (ekzemplo: sKORpiono).
2. Iu sankta libro.
3. Forigi eraron.
4. Kalka skeleto.
5. Unu de la sportoj.
6. Fluigas la sangon.
7. Pulso aŭ palpitaĵo.
8. Komponas baletojn.
9. En ĝi troviĝas la koro.
10. Obstina malpardono.
11. Troviĝas ekster la hejmo.
12. Per ili oni prenas la bovon.
13. Prepozicio signifblas "iom pli".
14. Kvanto de poentoj de ĉiu konkursanto.
15. Plej supera atingo el ĉiuj konkursantoj.
16. Foje oni akuzas fiajn politikistojn pri tio.

**SOLVOJ:** "ZIN": 1.musZINo; 2.magaZINo; 3.karmeZINa; 4.okaZINtaĵo; 5.kuZINo; 6.benzZINo; 7.ZINko; 8.edZINĝas; 9.ZINĝibro; 10.limoZINo; 11.uzZINo; 12.kaZINo.  
"KAT": 1.advoKATo; 2.KATedro; 3.KATo; 4.KATakombo; 5.verKATa; 6.KATaro; 7.KATamarano; 8.KATastrofo; 9.merKATo; 10.KATmanduo; 11.KATalogo; 12.musKATo; 13.musKATo; 14. KATegono; 15.KAToliko; 16.KATalzi. "KOR": 1.sKORpiono; 2.KORano; 3.KORekto; 4.KORalo; 5.KORboiko; 6.KORo; 7.KORbeto; 8.KORegorato; 9.KORpo; 10.rankORO; 11.KORio; 12.KORno; 13.ankORau; 14.sKORO; 15.reKORO; 16.KORupto.

## FALSAJ AMIKOJ

*Temas pri klariĝo de ofta misuzo de certaj vortoj kun pruntprenita signifo de aliaj vortoj.*

- 1-**adolto** ≠ **adulto** - La filmo estas permesata nur al **adoltoj** ĉar ĝi temas pri **adulto** fare de la edzo.
- 2-**aerporto** ≠ **flughaveno** - En la **flughaveno** oni ne **portas** **aero**.
- 3-**atrakcio** ≠ **allogo** - Tiu ĉi spektaklo ne estas tre **alloga**, sed tamen ĝia lasta parto estas vera **atrakcio**.
- 4-**aŭdienco** ≠ **aŭskultantaro** - Preleganto rakontis al **aŭskultantoj** ke li havas **aŭdiencan** ĉe la ministro.
- 5-**demandi** ≠ **peti** - Mi **petis** sin **demandi** kie estas necesejo. (Petu agon aŭ aferon, demandu sciigon.)
- 6-**ekskuzi** = **pardonpeti** ≠ **pardon** - Mi **ekskuzis** mian malbonan agon kaj li **pardonis** al mi.
- 7-**estimi** ≠ **taksi** - **Estimu** la taksiiston. Li estas tre **estimata** persono. Ĉu vi povas **taksi** lian agon?
- 8-**fantasta** ≠ **fantazia** - En **fantastaj** fabeloj aŭ sciencfikcioj, oni legas pri **fantaziaj** bestoj aŭ homoj.
- 9-**fronto** ≠ **frunto** - La soldato iris al la **fronto** kaj vundiĝis ĉe la **frunto**.
- 10-**governo** ≠ **gubernio** ≠ **registaro** - Membroj de **registaro** en iu **gubernio**, tenis **gubernistojn**, kiuj **gubernis** (=edukis kaj instruis) siajn infanojn.
- 11-**ignoranto** ≠ **malklerulo** - La direktoro ne volas scii pri la krizo kaj intence ne atentis ĝin (li estas **ignoranto**), sed tio ne signifas ke li estas **malklerulo** aŭ **sensiulo**.
- 12-**kampo** ≠ **tendaro** - La soldato loĝas en la **tendaro**, apud la **kampo**.
- 13-**kapitalo** ≠ **ĉefurbo** - La firmao havas oficejon en la **ĉefurbo**, kaj deziras pligrandigi sian **kapitalon**.
- 14-**kapitalo** ≠ **majusklo** - La firmao havas nomon kiu skribiĝas per **majuskloj**, kaj oficejon en **ĉefurbo**.
- 15-**kontroli** ≠ **regi** - Li malfacile **regas** la situacion, sed li sukcesas **kontroli** ĉu lia edzino estas hejme.
- 16-**korespondi** ≠ **respondi** - Mi **korespondas** kun belga belegulino sed ŝia konduto ne **respondas**, aŭ ne ekvivalentas, al mia konduto.
- 17-**krii** ≠ **plori** - "Ne **ploru**, Argentino", **kriis** la homamaso.
- 18-**kurioza** ≠ **scivola** - Mi volas rakonti al vi ion **kuriozan** (kuriozaĵon). Ĉu vi estas **scivola** aŭdi ĝin?
- 19-**kurso** ≠ **kurzo** - En la **kurso** ni lernis pri la **kurzo** de la dolaro.
- 20-**medio** ≠ **amaskomunikilo** - Niaj **amaskomunikiloj** ofte raportas pri la krizo de la **vivmedio**.
- 21-**merkato** ≠ **bazaro** - Mi vizitis la **bazonon** kaj eklernis, ke estas krizo en la **merkato** de la vestoj.
- 22-**mobila** ≠ **portebla** - Li mendis per sia **portebla** telefono (poŝtelefono) ornamaĵojn por la balo, inkluzive de **mobiloj**, kaj stabiloj, kiujn li intencas pendigi super la dantereno.
- 23-**negoci** ≠ **intertrakti** - Ministro **intertraktis** kun loka ministro, komercistoj **negocis** kun alilanduloj.
- 24-**oferi** ≠ **oferti** - Sahludisto **oferas** damon por sukcesi ŝahmaton. Kuiristo **ofertas** multkoston fiŝaĵon.
- 25-**rajti** ≠ **povi** - Vi **povas** stiri ebria, sed vi ne **rajtas**!
- 26-**rajto** ≠ **pravo** - Vi ne **pravas**, sed vi **rajtas** erari!
- 27-**romano** ≠ **amafero** - Iu **romano** priskribas **amaferon** aŭ amindumon inter **Romano** kaj **Romanino**.
- 28-**signo** (*signi*) ≠ **subskribo** (*subskribi*) - Bona **signo** estas ke li **subskribis** la ĉekon!
- 29-**standardo** ≠ **normo** - Laŭ la **normo** reganta en ilia armeo, ĉiu armea divizio havas sian **standardon**.
- 30-**vehiklo** ≠ **veturilo** - Li timas porti ŝin per sia **veturilo**, ĉar ŝi estas **vehiklo** de malsano, konsekvence ŝi stras sian propran **veturilon** por disdoni foliojn uzatajn kiel **vehiklo** de ŝiaj politikaj opinioj.

## KONATIĜU KUN LA PREZIDANTO DE EBG

Diversaj inter niaj membroj ne havas eblecon regule ĉeesti en niaj semajnaj kunvenoj aŭ okazon partopreni en niaj iniciatoj aŭ agadoj, pro tio estas oportuna konatiĝi niajn legantojn kun fotoj de niaj aliaj membroj kaj estraranoj. Hodiaŭ ni prezentas foton de nia plej grava membro laŭ postena funkcio, la prezidanto.



Foto de Angelos Tsirimokos, Prezidanto de Esperantista Brusela Grupo

## KOTIZ-TABELO 2009

Nr	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
<b>ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO</b>				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo! (25 X MEM kotizo)
<b>BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ</b>				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
<b>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO</b>				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	24	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	59	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	118	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenataj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1475	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)